Thomas Moore,

La lasta rozo

tradukita de Clarence Bicknell

Jen la lasta rozeto de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne unu rozflor'
Partoprenas kompate en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn disĵetas mi for
Al viaj kunuloj sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte formortus mi mem,
Se ne plu min atendus amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola sen amo-respond'?

Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer" de Thomas Moore *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* Clarence Bicknell *(∗1842-10-27 – †1918-07-17).*

Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poemtradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon `http://eo.wikisource.org/wiki/AEнtoro:Bicknell_C.,_Bordigheza`.

Thomas Moore,

'T is the Last Rose of Summer

'T is the last rose of summer left blooming alone;
All her lovely companions are faded and gone;
No flower of her kindred, no rosebud is nigh,
To reflect back her blushes, to give sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one! To pine on the stem;
Since the lovely are sleeping, go sleep thou with them.
Thus kindly I scatter thy leaves o'er the bed,
Where thy mates of the garden lie scentless and dead.

So soon may I follow when friendships decay,
And from Love's shining circle the gems drop away.
When true hearts lie wither'd and fond ones are flown,
Oh! who would inhabit this bleak world alone?

Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas Thomas Moore *(∗1779-05-28 – †1852-02-25).*

Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo `http://www.franks.org/fr01066.htm`. *Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon* `http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore`.